

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro A. BESSIERE	28, rue C. Saint-Saëns	76000 ROUEN
Sekr: F-ino G. PREUX	55/3 Terrasse Rue du 11 novembre	59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT	26 bis, rue de Milngavie	49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON	7, av. Salomon	59800 LILLE
Peranto IKUE: S-ro M. COLLEU	95, r. Victor Hugo	80440 BOVES

C.C.P.: Association Catholique Française pour l'Espéranto 2 324 93 N ROUEN.

==== la n<sup>o</sup>: 8 F. Abono: 30 F. Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

==== N<sup>o</sup> 184 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

==== MARTO 1995 ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

## LE MOT DU PRESIDENT

Nos ancêtres les Gaulois - pour parler comme les livres d'histoire de notre ~~enfance~~ enfance - avaient fait de l' alouette le symbole de leur nation.

Nous le savons, l' alouette vole vite et haut vers le ciel, puis se laisse retomber pour repartir de plus belle.

Cette alouette est aussi à notre image. Les élans de notre coeur, la force de notre volonté, le désir de mieux faire nous poussent à nous élever. Mais notre faiblesse humaine, jointe aux dures conditions de la vie, nous fait souvent chuter. Cependant l' essentiel, c' est comme l' alouette, de rebondir et de reprendre notre ascension, sans jamais nous laisser abattre.

Cet effort continu vers le Bien et l' accomplissement de notre devoir fait notre grandeur de chrétien. Sur le chemin que nous a tracé le Christ, nous chutons souvent, mais nous repartons aussitôt sans nous décourager, car nous sommes sûrs d' être encouragés et aidés.

Comme espérantistes, nous devons agir de même. Nous savons par expérience ce combien il est difficile de vaincre les préjugés qui frappent encore la Langue Internationale et entravent sa diffusion.

Mais depuis plus de 100 ans, nous ne cessons de ~~répéter~~ présenter à nos contemporains l' outil merveilleux que constitue l' Esperanto pour la compréhension et l' amitié entre les hommes. Et depuis 100 ans, le succès est venu malgré les obstacles. Le mouvement espérantiste est maintenant connu et répandu sur l' ensemble des cinq continents. Nous devons en être fiers et nous réjouir sans réserves.

A.B.

.. / ...

LA BILETO DE LA PREZIDANTO

Niaj prauloj, la Gaŭloj - se paroli kiel la libroj pri historio de nia infanaĝo - igis la alaŭdon simbolo de sia nacio.

Ni tion scias, la alaŭdo rapide kaj alte ĉielen flugas, kaj sin lasas fali por vigle reekflugi.

Ankaŭ ni similas tiun alaŭdon. Niaj koraj elanoj, nia volforto, la deziro pli bone agi puŝas nin al plialtigo. Sed nia homa malforto, kuigita kun la streĉaj vivkondiĉoj, ofte faligas nin. Tamen la ĉefa afero, kiel por la alaŭdo, estas resalti kaj daŭrigi nian supreniron, neniam lasante nin senkuraĝigi.

Tiu daŭra strebado al la Bono kaj la plenumo de nia devo konsistigas niam kristanan econ. Sur la vojo, kium indikis al ni Kristo, ni ofte falas, sed ni tuj ree ekiras ne perdante la kuraĝon, ĉar ni estas certaj pri kuraĝigo kaj helpo.

Kiel esperantistoj, ni devas same agi. Laŭsperte ni scias, kiel malfacile estas venki la antaŭjuĝojn, kiuj ankoraŭ trafas la Internacian Lingvon kaj ĝenas ties disvastigadon.

Sed de pli ol 100 jaroj, ni daŭre prezentas al niaj samtempuloj la mirindan ilon, kiu estas Esperanto por la kompreno kaj amikeco inter la homoj. Kaj de 100 jaroj, la sukceso venis malgraŭ la obstakloj. La Esperanto-movado estas nun konata kaj disvastigata sur la kvin kontinentoj. Pri tio ni devas fieri kaj senlime ĝoji.

\*\*\*\*\*

EKLEZIO, NIA PATRINO

Apartigu iun sunradion el la suno, kaj la lumo ne malkreskos.

Forŝiru unu branĉon el la arbo, kaj la disŝirita branĉo ne plu povos ĝermi. Distranĉu rivereton el ĝia fonto, kaj la akvo ne plu fluos.

Estas same por la Eklezio.

Lumigita de la dia lumo, ĝi disradias ĝiajn radiojn sur la tuta terglobo; tamen ĝia lumo, ĉie dissendita estas unu, kaj ĝia ĉefparto ne estas pecigita; ĝiaj branĉoj kovras la tutan teron per sia abunda vivopleneco; ĝiaj riveretoj abunde elverŝas akvon malproksimen.

Tamen unika estas la kapo, unika la fonto, unika la patrino, kiu senfine naskas idojn.

La Eklezio naskas nin; ĝia lakto nutras nin; ĝia animo vivigas nin.

S-ta Cipriano, episkopo en Kartago,  
martirigita en 258

\*\*\*\*\*

POEMO EL AFRIKO

Mi malsatis kaj vi fondis homaman klubon,  
ĉe kiu vi pridebatis mian malsaton.  
Pri tio mi dankas vin!

Mi malsaniĝis  
kaj vi surgenu teren falis  
por danki la Sinjoron pri la bonfarto,  
kiun li donas al vi.

Mi restadis en malliberejo  
kaj vi enŝoviĝis en preĝejon,  
preĝante por mia liberiĝo.  
Pri tio mi dankas vin!

Mi senhajme estis  
kaj al mi vi predikis  
pri la riĉaĵoj de la Dia amo.

Mi nuda staris,  
kaj vi serioze pritraktis  
la moralajn konsekvencojn  
de mia nudeco.

Vi ŝajnis tiel piaj,  
tiel proksimaj al Dio!

Sed mi daŭre malsatas; daŭre sola, nuda, malsana,  
malliberigita kaj senhejma mi estas. Mi frostas!

El la franca gazeto "Solidaires" - Solidaraj  
trad. P-ro Goudé



La komitato bedaŭras, ke oni ne ricevis informon pri la tutlanda kongreso en 1996; ĝi ankaŭ pristudis la eblecon kongresi nur unu jaron el du. La findecidon oni prenos en Limoges.

Oni pristudos la eblecon kongresi en La Houssaye-en-Brie en 1997.

La nova peranto de IKUE estas S-ro Colleu, kies adreson oni trovos sur la kovrilpaĝo de la bulteno.

La komitato jam preparis la ekumenan diservon en Paris okaze de la eŭropa kongreso. S-ro Despiney kontaktos la paroĥestron en Montrouge kaj P-ro Héroux prizorgos la liturgian tekston kun la franca sekcio de KELI.

Por la renovigo de la IKUE-estraro, nia asocio prezentas tri kandidatojn: ~~S-roj~~ P-ro Héroux, S-roj Bessière kaj Pons, kiel plenumkomitatanojn.

P-ro Bourdon donis interesajn informojn pri sia laboro en Lille, kie li diservis en Esperanto okaze de Kristnasko, kaj gvidas biblian studrondon. Li ankaŭ starigis esperantan partoprenon en la pilgrimo al Banneux (Belgujo). Li emfazis la gravecon de la spirita movado Morimond kaj de la pola katolika intelektula klubo. P-ro Bourdon (7, av. Salomon 59000 LILLE), volonte donos detalojn al la interesuloj.

La venonta komitatkunveno okazos en Limoges lundon, la 22-an de majo 1995.

Protokolis A.B.

XX

PRI LA KORANO (fino)

La Anunciacio kaj la naskiĝo de Jesuo estas elvokitaj en du muzulmanaj fragmentoj. Iu anoncanto, la Spirito de Dio, kiu prenis homan formon, venas al Maria: la unuanima tradicio vidas Gabrielon en tiu Spirito de Dio, ĉar en araba lingvo, la Spirito, eĉ kiam la muzulmanoj parolas pri la Sankta Spirito, estas ĉiam anĝela kreitaĵo. La rakonto estas farita de la komenco ĝis la fino por reliefigi la miraklojn de Jesuo, inter kiuj la unua estas lia virga naskiĝo. La insistado pri la virgeco kaj pureco de lia patrino estas maniero reliefigi la miraklon.

La naskiĝo mem okazas piede de daktilpalmo, kies daktilojn Maria mirakle manĝos, kaj kiu lasos ekflueti akvan fadeneton sur la sojlo (surao 19, 24-25). La kadro kaj la mirindaĵo estas la samaj kiel en la fuĝo al Egiptujo en la Evangelio de la pseŭdo-Mateo (rearanĝo de la praevangelio de Jakobo por la uzado de la okcidentanoj). Tiu teksto datumas de Mekko kaj ankoraŭ ne entenas la pli precizajn indikojn, kiujn la Korano havas en Medino pri la titoloj kaj misio de Jesuo.

La alia rakonto, kiu ankaŭ komenciĝas per la Anunciacio, estas pli provizita. Maria estas alparolita de la anĝeloj. Ŝi estas elektita inter ĉiuj virinoj de la mondo kaj purigita. La titoloj de Jesuo tiam estas donitaj: Li estas Verbo de Dio. Lia nomo estas "Meso, Jesuo, Filo de Maria" (surao 3, 40). Aliloke, Li estas nomata "la Apostolo de Dio kaj lia Verbo, kiun Li ĵetis en Marian. Li estas Spirito devenanta de Dio". (surao 4, 169). Kiel Adamo, Jesuo estas kreata sen patro (surao 3, 52). Dio instruos al Li la Skribon, la Saĝecon, la Toron kaj la Evangelion. Li estas sendita al la izraelidoj (sed nur al ili, aldonas la muzulmanoj). Jesuo plenumas miraklojn. Li sanigas la denaskan blindulon kaj la leprulon, revivigas la mortintojn - kun la permeso de Dio, precizigas ĉiam la teksto kun insistado -. Fragmento priskribas Jesuon preĝantan Dion por malsuprenigi provizitan tablon el la ĉielo (surao 5, 114); ĉu estas svaga memoraĵo pri la multobligo de la panoj aŭ pri Eŭkaristio? Estas malfacile scii tion.

La morto de Jesuo aŭ lia releviĝo faras problemon (surao 3, 47-48). La savplano de Dio, en Islamo, entenas neniam lokon por la kruco (surao 4, 156). Jesuo estas levita al la ĉielo de Dio. La tradicio atendas lian revenon por la tempofino.

Koncerne la Eklezion, la Korano ne parolas pri ĝi.

Kompilita de M. Colleu

XX

NIA MEMBRARO

Novaj anoj 1995:1)S-ino LE COGUEC (Morbihan);2)S-ro AUDOUIN (I&V);3)S-ro VILAS (Vienne);4)5)G-roj LANDRIN (I&L);6)F-ino GIUDICELLI (Paris).

Koran bonvenon al ili!

.. / ...

Membroj bonfarantoj 1995: 1. S-ro BESSIERE; 2. S-ro SANSON; 3. S-ino CHEVERRY;  
4. S-ro COLLEU; 5. S-ro LECOQC; 6. S-ino GUILLOT; 7. S-ino GILLES;

Koran dankegon al tiuj membroj, kiuj grave helpas la asocion.

+++++

LA KRISTANA ORIENTO (daŭrigo)

el "Bulletin de l' Oeuvre d' Orient" n° 684 - 20, r. du Regard 75006 PARIS

Siatempe, tiuj revelacioj tiel sensaciis, ke multaj altrangaj vizitantoj alsturmis la aŭgustenan monaĥinejon, kies animo estis la viziulino. Inter ili elstaras grava reprezentanto de la germana romantismo, Clemens Brentano (1778-1842) kiu cetere konvertiĝis al katolikismo sub la influo de Katerina. Brentano instaligis en Dülmen kun la intenco kolekti la revelaciojn el la buŝo mem de la viziulino, kaj noti ties dirojn en verkaĵo, kiun oni publikigos nur en 1835 sub la titolo: "La dolora Pasiono de Nia Sinjoro Jesuo-Kristo".

De Brentano, oni krome postmorte eldonis libron titolitan: "La vivo de la Virgulino Maria laŭ la revelacioj de K. Emmerich". El la antaŭlasta ĉapitro de tiu libro, ni eltiras la jenon: "Post la Ĉieliro de Kristo, Maria vivis tri jarojn en Sion, tri jarojn en Betania kaj naŭ jarojn en Efezo, kien Johano kunprenis ŝin melonge post kiam la judoj forlasis Lazaron kaj lian fratinton sur la maro (1). Maria ne loĝis en Efezo mem, sed en la ĉirkaŭaĵo, kie pluraj virinoj intimaj al ŝi jam instaligis. La restadejo de Maria troviĝis, kiam oni venas el Jerusalemo (per la ŝoseo), je ĉirkaŭ tri leŭgoj kaj duono de Efezo sur monteto maldekstre".

Sekvas pliaj precizigoj. Antaŭ ol konduki Marian en tiun izolitan lokon, Johano konstruigis por ŝi ŝtanan domon. Tiu domo, situanta apud plataĵo duobleŭgon perimetra, estas konstruita sur deklivo de monto. El ties supra, cetere ne malproksime de la domo, oni samtempe ekvidas Efezon en la malproksimo kaj la maron tute apudan kaj insuloplenan.

En tiu diskreta restadejo, la Virgulino Maria travivis siajn lastajn jarojn antaŭ ol forpasi.

Jen la kerno de la revelacioj de K. Emmerich rilate la ĉeeston en Efezo de la patrino de Jesuo.

(daŭrigota)

(1) K. Emmerich tiel datas la foriron de la Virgulino ol Efezo antaŭ la persekutado fare de Hérode Agrippa (42). Tamen, laŭ tiu kronologio, la Virgulino estus mortinta ĉ. 46, proksimuma dato akceptita en la antaŭa kroniko.

+++++

REGULARO DE SANKTA BENEDIKTO (daŭrigo)

Kaj la Sinjoro, serĉante sian laboriston en la homamaso, al kiu Li krias, plie diras: "Kiu estas la homo, kiu deziras vivon kaj amas bonajn tagojn?" Se vi aŭdante respondas: "Mi", tiam Dio diras al vi: "Gardu vian langon kontraŭ malbono, kaj vian buŝon kontraŭ mensoga parolo; dekliniĝu de malbono kaj faru bonon, serĉu pacon kaj ĉasu ĝin". (Ps. 34, 1 kaj 14-15). Kaj kiam vi estos farintaj ĉi tion, miaj okuloj estos sur vi kaj miaj oreloj estos atentaj al viaj preĝoj, kaj eĉ antaŭ ol vi alpreĝos min, mi diros: "Jen Mi estas". (Jesaja 58, 9). Kio pli dolĉa por ni, ŝategitaj fratoj, ol tiu voĉo de la Sinjoro, kiu invitas nin? Jen, pro Lia tenereco, la Sinjoro montras al ni la vojon de la vivo. Kun la lumoj zonitaj per la fido kaj la plenumo de la bonagoj, ni sekvu Liajn vojstrekojn sub la gvidado de la Evangelio, por ke ni meritu vidi Tiun, kiu vokis nin en sian regnon. (variante: por ke ni meritu vidi en Lia regno Tiun, kiu vokis nin.) Se vi volas loĝi en la tabernaklo de Lia regno, vi devas kuri per la bonagoj, sen kiuj vi ne tien alvenos. Sed se ni, kun la profeto, demandas al la Sinjoro, parolante al li: "Ho Eternulo, kiu povas gastigi en Via tendo? Kiu povas loĝi sur Via sankta monto?" (Ps. 14, 1). Post tiu demando, fratoj, ni aŭdu la Sinjoron, kiu respondas kaj montras al ni la vojon al sia tabernaklo, dirante: "Tiu, kiu vivas honeste, agas juste, kaj parolas veron el sia koro; kiu ne kalumnias per sia lango, ne faras malbonon al sia kunulo, kaj ne ĵetas amlonon sur sian proksimulon". (Ps. 14, 2-3). Li estas tiu, kiu, pro konsilo de la Malbonulo, forpuŝas ĝin kaj ĝian konsilon malproksimen de la rigardoj de sia koro, nenligas ĝin, "prenas kaj frakasas ĝiajn infanetojn kontraŭ Kriston". (Ps. 136, 9).

(daŭrigota)



RENOVIGO DE 1/3 DE LA KOMITATO

Instrukcioj por la voĉdonado:

1. Respondu la demandojn 1 kaj 2 sur la voĉdonilo ĉi sube.
2. Enmetu la voĉdonilon (eventuale ankaŭ la rajtigilon) en koverton, sen indiko.
3. Enŝovu ĉi tiun en alian, kiun vi sendu al la sekretario, F-ino Preux, antaŭ la 20-a de aprilo 1995. Dorse de tiu dua koverto, skribu vian nomon.

N.B. Ne sendu ion plian en ĉi tiu koverto, ĉar oni malfermos ĝin nur en Limoges.

RAJTIGILO

La subskribinto (nomo kaj voknomo)  
ne povas partopreni la kongreson en Limoges kaj rajtigas  
reprezenti min kaj preni mianome ĉiujn decidojn por la bono de F.K.E.A.

Antaŭ la subskribo,

Dato kaj subskribo:

skribu mane "Bon pour pouvoir"

VOĈDONILO

sendota al F-ino Preux mepre antaŭ la 20-a de aprilo 1995.

1. Ĉu vi aprobas la agadraporton (p. 3)                    JES    NE    SINDETENO    (1)
2. Ĉu vi aprobas la financon raporton? (p. 3)            JES    NE    SINDETENO    (1)
3. Renovigo de 1/3 de la komitato. Estas 4 kandidatoj por 4 postenoj. Vi rajtas forstrecki aŭ aldoni nomojn, sed devas esti maksimume 4 nomoj entute.

S-ro COLLEU Marcel

F-to MARMOU René-Jean

S-ro PONS Roger

S-ro VILLENEUVE Georges

(1) Forstrecku la senutilaĵojn.

N.B. ĈU VI ATENTE LEGIS LA INSTRUKCIOJN POR LA VOĈDONADO??

INFORMOJ

- 1. Hungarujo - 1-7/7/95: lingvoinstruado; 15-21/8/95: pri naturprotektado; 12-15/10/95: pri komuna kultura laboro.  
Turisma oficejo por Eo--aranĝoj Nyirpalota Ut. 107 H-1157 BUDAPEST
  - 2. Ĉeĥa respubliko - 48-a kongreso de IKUE 8-15/7/95. Inf: Centra oficejo de IKUE Casella Postale 4017 APPID I-00182 ROMA RM Italujo
  - 3. Pollando - 15-19/7/95: 14-a Literatura forumo. LF-Koop- Eo Pen-Centro Pf 117 H-1581 BUDAPEST Hungarujo
  - 4. Italujo - 8-12/9/95: 9-a kongreso de italaj katolikaj esperantistoj. Inf: Mario Sola, via Bringhinzio 7 I-131100 VERCELLI Italujo.
- XX

KOTIZTABELO 1995

I.K.U.E. kun "Espero Katolika" 150 F  
 Peranto: S-ro M. COLLEU p.ĉ.k. LILLE 10 621 81 P.

-----

A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" - unuopulo 40 F  
 geedza paro 50 F  
 infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o 20 F  
 bonfaranto 200 F

-----

U.F.E. kun "Revue Française" kaj "Eo Actualités" 280 F

U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro 300 F

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

XX

ENHAVO

- |                                |                             |
|--------------------------------|-----------------------------|
| 1. Le mot du président         | 5. La kristana Oriento      |
| 2. La bileto de la prezidanto  | Regularo de S-ta Benedikto  |
| Eklezio, nia patrino           | 6. Preĝo al la S-ta Spirito |
| Poemo el Afriko                | Rumana IKUE-sekcio          |
| 3. Agadraporto                 | Amuza angulo                |
| Financa raporto                | 7. Rajtigilo kaj voĉdonilo  |
| Protokolo de la komitatkunveno | 8. Informoj                 |
| 4. Pri la Korano               | Kotiztabelo                 |
- XX

Dépôt légal: 1er trimestre 1995 !! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée le 6 !! mai 1977 à la sous-préfecture de Saumur sous C.P.P.A.P. n° 62 532. !! le n° 2 523 bis, J.O. 23/05/1977) Directeur: Albert BESSIERE !! au Prieuré St-Martin Directeur-délégué: !! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE René-Jean MARMOU !! FRANCE

\* & \* & \*